

Leterujo, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 529, 1973.11.28 & 12.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ tri semajnoj ni malfermis nian leterujon por respondi al la afablaj salutoj de niaj skribemaj geaŭdantoj. Ni tiam menciis, ke alvenis poŝtkartoj kaj leteroj el 20 landoj.

A.- Inter tiuj mesaĝoj troviĝis registraĵo de mallonga intervjuo, kiun sinjoro Ludwig Robel el Kronach, Germanio okcidenta faris kun sinjoro Antal Münnich el Budapeŝto, Hungario, okaze de Internacia Kongreso pri Komputera Lingvistiko, kiu disvolviĝis en la universitato de la itala urbo Pisa. Kiel vi konstatos, en tiu registraĵo sinjoro Antal Münnich, kiu estas programisto kaj fakulo pri komputera aŭ matematika lingvistiko, esprimas la vidpunkton, ke la programistoj nun serĉas lingvon pli taŭgan por la komputera uzo, ol la angla aŭ rusa. Li mem proponis lingvo-sistemon bazitan sur Esperanto. Kaj li opinias, ke la elektita lingvo iom post iom fariĝos la vera internacia lingvo. Por li la ekuzo de la komputeroj alportas kulturen revolucion kompareblan al tiu, kiun siatempe alportis la presarto. Ĉu la angla aŭ Esperanto profitos pri tiu transformo tre profunda de la intelektaj kutimoj ? Al tio oni povos respondi post kelkaj jaroj aŭ jardekoj.

Cl.- Nun ni lasas la parolon al sinjoro Ludwig Robel el Kronach, kiu intervjuis por la Svisa Radio sinjoron Antal Münnich el Budapeŝto, tio en la urbo Pisa :

(bedaŭrinde la transskribo de tiu sonregistraĵo de 4 minutoj 42 sekundoj ne efektiviĝis dum la ekzisto de la koncerna sonbendo.)

Cl.- Vi aŭdis programiston Ludwig Robel el Kronach, kiu intervjuis sinjoron Antal Münnich el Budapeŝto. Ni instigas forte la gvidantojn de la esperanto-movado inviti sinjoron Münnich en internaciajn aranĝojn, por ke li povu prelegi pri la nun aktualega temo matematika aŭ komputera lingvistiko. Fariĝas urĝe necese, ke la esperantistoj iomete sciu, kio estas la celado de tiu nova fako de la lingvistiko. Scio malaperigas timon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!